



Aprilo-Majo 1952 N-ro 8-9

# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graafdiijk (NH), Nederlando  
Gironumero 382363

Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

## VIVO SUR ALIAJ PLANEDOJ.

Dum la pasintaj kelkaj jaroj mi legis artikolojn, ankaŭ en La Juna Vivo, pri la ebleco de vivo sur Marso aŭ aliaj planedoj, kvankam mi ankoraŭ ne legis iun atentindan teorion. Aŭ la verkintoj malatentis la sciatajn faktojn aŭ ili ne sciis ilin. Do, leginte la artikolon en la januara numero de LJV (1951), mi multe bedaŭris, ke ankoraŭ ne aperis findinda artikolo.

Unue, ne ĉiuj astronomoj konstatas „kanalojn” sur Marso. Kaj la kanaloj ne estas ĉiam trovataj de tiuj, kiuj kredas pri ili. Post kiam ia unua astronomo raportis la unuan fojon, ke li vidis la „kanalojn”, pluraj aliaj astronomoj serĉis ilin, sed dum eble dudek jaroj oni ne revidis la „kanalojn”. Poste oni ja revidis ilin, sed eĉ nun ilia ekzisto ne estas ĝenerale akceptata.

Supozante, ke ekzistas io kaj ke ne temas nur pri ombroj, kiuj estas kaŭzataj de iu variantajo astra, ni renkontas la fakton, ke neniel estas certe, ke tiuj „kanaloj” estas tiel perfektaj kiel deklaris multaj neastronomoj. Eĉ per niaj plej bonaj teleskopoj Marso aperas ankoraŭ kiel ero kaj iom da atento sur la tero rilate al terajoj montros, ke malrektaĵoj aperas rektaĵaj, kiam oni staras nur iom malproksime. Se ni estas tiel ege for de Marso, io tre malrekta aspektus rekta al ni.

Plue, eĉ se ekzistus la „kanaloj”, ni ankoraŭ ne rajtus diri: „La naturfortoj ne povas fosi rektliniajn kanalojn sur tiom vasta etendaĵo por transporti la akvon de la polusoj al la ekvatoro.” La ideo, kiun esprimas tiu frazo, ke akvo estas ja kondukata tra la „kanaloj”, estas nur penso de kelkaj romantikuloj. La astronomoj ankoraŭ ne konstatis eĉ, ke ja ekzistas glacio kaj neĝo ĉe la marsaj polusoj kaj la malapero de tio, kion ni laŭ supozo nomas neĝo, povas havi multajn kaŭzojn. Mi menciuj plue, ke ni ne scias eĉ, ke la „kanaloj” (se ili ekzistas) estas nur linioj. Por povi vidi profundecon, ĉi tiu devus esti giganta kaj la linioj, eble vidataj, ne povas montri aŭ profundecon aŭ malprofundecon.

Eĉ multaj partoj de la luno ne estas konataj pro la distanco inter ni kaj ĝi. Se ni ankoraŭ ne scias, ĉu kelkaj nigraĵoj de la luno estas profundajoj, kiel ni povus scii pri Marso?

Alia absurda populara ideo estas, ke, se ja ekzistas vivo sur Marso, ĝi nepre estas mortanta kaj malnova. Mi legas: „la klimataj kondiĉoj kaj la maldenseco de la atmosfero sufokas la lastajn sopirojn.” Tio estas nur konjekto bazita sur iu fiero, ke la tero estas la plej bona mondo, — restaĵo el la mezepokoj. La ideo, ke vivo sur alia planedo similus al la nia, eĉ iomete, estas matematike kaj science preskaŭ absurda. La klimato de Marso ne ŝanĝiĝis multege dum la pasintaj kelkmil jaroj kaj estas sence supozi, ke iu alta civilizacio ne povus kontraŭi la klimaton per inventaĵoj, kiel ni ĝin kontraŭas per ĉiaj ŝirmiloj. Estas kemia fakto, ke ne nur oksigeno, sed ankaŭ aliaj gasoj povas subteni bruladon. Estas astronomia fakto, ke estas maleble eĉ iomete precize mezuri la oksigenkvanton de alia planedo, ĉar nia propra atmosfero influas niajn mezurilojn ĝis ne sciata grado. Astronomoj konfesas, ke, kvankam la populara ideo estas, ke la oksigenkvanto marsa estas malgranda, estas ankaŭ eble, ke la planedo Marso havas tute tiom da oksigeno kiom ni. Kvankam la evoluo-teorio ne estas plene akceptata de ĉiu, nun ĉiu ja akceptas la fakton, ke vivantoj konstante ŝanĝas sin, laŭ la eksteraj klimatoj kaj statoj.

Ĉu estas vivo sur aliaj planedoj? Nepre. Neniu serioza astronomo aŭ sciencisto malkonfesas tion. Ĉu sur aliaj planedoj konataj al ni? Eble. Esceptante kelkajn grandajn planedojn, tamen, ni tute ne rajtas diri, ke tiu vivo estas sur Marso, kaj ne sur, ekzemple, Venuso. Kial oni ne serioze konsideras Venuson? Ĝi estas relative proksime al la tero kaj eĉ pli bone — ni ĝin ajn scias pri ĝi. Pro ĝia loko kaj ĝia granda atmosfero nuba, ni eĉ ne scias pri ĝia turnrapido kaj ankoraŭ ni ne vidis ĝian teron.

Sed, preparante nin por eventuala renkonto kun iu el alia planedo, ni forgesu la popularajn ideojn kaj konstatu la faktojn:

1. ke konscia inteligenta vivo estas neverŝajna;
2. ke, se la vivo estas ja inteligenta, ĝi ne estas multe pli malnova aŭ pli nova ol la nia;
3. ke ĉiuj niaj sciencaj teorioj kaj ideoj estos forigitaj aŭ tute ŝanĝitaj;
4. ke vivi aktive sur alia planedo ol la nia al ni ne estos eble, do la romanaj raketmilitoj estas tute malveraj.

Rekonante ĉiujn tiujn punktojn, multaj personoj sendube seniluziĝos pri la tuta afero. Dum centoj aŭ miloj da jaroj iu ajn kontakto kun aliaj planedoj estos intelekta kaj pure scienca kaj tre neklara. Escepte se ni unue foratombombos nin.

Donald R. Broadribb, Rochester 20, Usono.

# ANKORAŬ PRI LA FUMADO KAJ LA KANCERO.

(En la junia n-ro 1950-a de L.J.V. mia amiko kaj kolego H. Wernik publikigis verkaĵon pri „La fumado kaj la kancero“.

Nun mi deziras aldoni alian verkaĵon pri la sama temo, kiu aperis en la itala revuo „Oggi“ (Hodiaŭ) n-ro 3, 1951-a.)

## Arseniko kaj Tabako.

De multaj jaroj oni parolas pri la rilatoj inter la fumado kaj la pulma kancero. Multaj kaj famkonataj patologistoj akceptas ĉi tiun devenon, montrante en la fumado hemian stimulon, kiu sufiĉas por estigi neoplasmon en la pulmoj. Aliaj malakceptas ĉi tiun eblecon.

Tamen, pro la kroniko, mi indikas, ke lastatempe du anglaj sciencistoj kaj kuracistoj pozitive skribis pri ĉi tiu afero en sia raporto, kiu aperis en „Angla Medicina Revuo“.

La du sciencistoj, Richard Doll, de la Sekcio de Statistikaj Esploroj ĉe la Societo de Medicinaj Esploroj, kaj doktoro Bradford Hill, direktoro de la sama sekcio kaj instruisto de la Medicina Statistiko ĉe la Londona lernejo de Sanigo kaj Tropika Medicino, diras, ke la arseniko, kiu estas en la fluidaj insektmortigiloj, per kiuj oni banas la tabakfoliojn, estas la plej rekta kaŭzo de la estiĝo de kancero en la pulmoj de fumadantoj.

Ili ekzamenis 1732 fumadantojn malsanajn pro pulmaj neoplasmoj aŭ pro stomaka aŭ intesta kancero kaj 742 pacientojn pro aliaj malsanoj. Inter la fumadantoj, kiujn trafis la kancero, 649 viroj kaj 60 virinoj havis ĝin en la pulmoj. Inter la malsanuloj pro pulma kancero 0,3 % de la viroj kaj 31,7 % de la virinoj ne fumadis.

La aŭtoroj klasifikis „fumadanto“ ĉiun ajn, kiu en unu jaro fumis almenaŭ unu cigaredon ĉiutage.

La du kuracistoj eltrovis, ke post la 45-a jaro la danĝero por pulm-kancero pligrandiĝas proporcie al la fumitaj cigaredoj. Ĝi estas 50 fojojn pli granda por tiuj, kiuj fumas 25 cigaredojn ĉiutage, ol por nefumantoj.

Ne estas sufiĉe provite, ĉu la enspiro de la fumo kaŭzas la malsanon, ĉar oni ne jam scias, en kiu parto de la fumo loĝas la transportilo de la kancero.

La konkludo de la esploristoj tamen estas, ke la indiko, ke la arseniko povas estigi pulman kanceron, estas aparte interesa: laŭ hemia vidpunkto ĝi estas fakte en la fumo la elemento, kiu havas la plej grandajn kvalitojn por kaŭzi kanceron.

La raporto de la du anglaj kuracistoj, kiun mi ĉi tie mallonge resumis, certe prezentas grandan helpon en la serĉo al la kancera stimulo en la pulmaj neoplasmoj, tamen la statistiko, kiun ili aldonis, ne sufiĉe pravas ilian interesan patogenian hipotezon.

Carlo Crovetto (medicina studento), Genova, Italujo.

La plej alta ordono de la Naturo estas: Fariĝu kio vi estas. Ĝi estas la ordono de la semanto al siaj semeroj, de la kreanto al siaj kreitaĵoj.

Ni naskiĝis kiel originaluloj, ni ne mortu kiel kopioj!

**Ekskurso al Århus.**

La ĉefurbo de Jutlando estas tre malnova urbo laŭ aĝo, sed dum vizito ĝi aspektas treege moderna. Jam antaŭ mil jaroj oni nomis la urbon „episkop-sidejo” (la urbo, en kiu la reĝo aŭ episkopo loĝas, ja estas eminenta) kaj nun la urbo estas la dua laŭ grandeco (150.000 loĝantoj). La urbdomo kaj la universitato estas ampleksaj, novaj kaj tre modernaj konstruaĵoj, kies stilo plaĉas al tiuj, kiuj apartenas al la moderna epoko — vi, kongresanoj, mem konvinkigu dum via vizito en la daŭro de la tuttaga ekskurso. Vi vizitos ankaŭ „la malnovan urbon”, kiu estas kolekto de malnovaj konstruaĵoj (originaj), kunmetitaj kaj aranĝitaj kiel urbeto kun stratoj, placoj k.t.p. La domoj estas el diversaj danaj urboj. En la malnovaj butikoj oni vidas la samtempajn vendaĵojn, ekzemple ĉe la bakisto oni vidas panon kaj kukojn, kiujn li vendis siatempe, sed kiujn la junularo neniam vidis aŭ gustumis; ĉe la komercisto oni same vidas la tiutempajn varojn. En la laborejoj de la plej diversaj metiistoj oni vidas iliajn ilarojn kaj en la urbestra domo troviĝas meblaro de diversaj epokoj. Eĉ lernejo situas en la urbeto, kiu estas bonege aranĝita en parto de la botanika ĝardeno. La vizito en ĝi estos tre interesa kaj amuza kaj mi tre ĝojas, ke vi havos okazon rigardi ĉi tiun vidindaĵon.

Sed ĉu vi povus viziti Danlandon, ne vidante per propraj okuloj, kiel oni efektivas la kooperativan sistemon? Laŭ ĝi la konsumantoj de la varoj kunigas sin en asocion kaj aĉetas la varojn en komuneco (do pli malmultekosta pro la grandaj kvantoj) kaj la gajnitan profiton oni dividas inter ĉiuj membroj laŭ ilia aĉeto. La sistemo estas nun treege bone organizita; vi en ĉiu urbo trovas vendejojn. La kooperativa movado eĉ posedas proprajn fabrikojn, kiuj produktas la plej grandan parton de la bezonataj varoj. En Århus troviĝas tia fabriko kaj vi vizitos ĝin por informiĝi pri la kooperativa movado kaj por propraokule vidi la ideon efektivigita. La fabriko regalos vin per kafo, dum la vizito. La kooperativa entrepreno havas la danlingvan nomon: Faellesforeningen for Danmarks Brugsforeninger, mallongigite: FDB.

En la urbdomo de Århus vi estos oficiale akceptataj.

La vesperon vi pasigos kun Århusaj esperantistoj en arbarrestoracio, kie vi vespermanĝos kaj festos, i.a. vi vidos prezentadon de popoldancantoj en nacia kostumo.

K. P.

**Unua listo de partoprenantoj:** 1. Kaj Pedersen, Kopenhago (Dan.); 2. Tammo Kanter, Leeuwarden (Ned.); 3. G. Milanowski, Bremen (Germ.); 4. H. Mees, Wattenscheid (Germ.); 5. P. Watson, Londono; 6. Helmi Veldhuyzen, Delft (Ned.); 7-8. ges-roj Neussner, Berlin; 9. A. Dalferth, Aalen; 10. J. Spiegel, Wirtemberg; 11. H. Volk, Mülheim; 12. W. Bernhardt, Berlin; 13. E. Borntträger, Herford (ĉiuj el Germanujo). El Anglujo: 14-15. ges-roj J. G. Teare, Liverpool; 16-17.: ges-roj J. H. Sullivan; 18. K. Sullivan; 19. D. E. Sullivan; 20. J. V. Sullivan; 21. Norman Williams; 22. G. Williams; 23. T. Williams; 24. s-ino E. C. Eades; 25. P. B. Eades; 26. M. Heaton; 27. O. Murtagh; 28. E. Johson; 29. J. Carrington; 30. M. Bury (ĉiuj el Manchester); 31. H. A. Wilson; 32. D. Jackson; 33. F. J. May (ĉiuj el Essex); 34. M.

Needham (Manchester); 35. M. Proudlove (Salford 6); 36. C. Mills; 37. J. Morris; 38. B. Shawcroft; 39. C. Mayor; 40. P. M. Spittle 41. J. Mellor; 42. C. A. Gutcliffe; 43. E. A. Lees; 44. W. Pearson; 45. B. G. Clayton; 46. A. Hardy; 47. B. J. Broadbent; 48. Tr. Bury (ĉiuj el Manchester); 49. C. N. Bleyswijk, Haarlem (Ned.).

Kiu intencas partopreni nian IJK káj ne jam sendis sian aliĝilon al la LOK, bonvolu ne plu prokrasti tion. Per via prokrasto vi multe pli mal-faciligas la taskon de la organizantoj! Rapidu! Adr.: Brønshøjvej 62, Kopenhago, Danujo.

## REMEMOROJ PRI RY.

Estis bela somera tago en la jaro 1932-a, kiam mi staris sur la stacidomo de Ry kaj ĉirkaŭrigardis. En nia karavano estis dudeko da gejunuloj kaj Hans, dana knabo 18-jara, alta, fortika, bluokula kaj blonda, Hans estis nia gvidanto.

Tuj ekster la stacidomo troviĝis nia gastejo: moderna vilao kun sufiĉe ampleksa ĝardeno. Ĉe la malsupro de la ĝardeno estis nova ligna kabano; tio estis nia dormejo.

Por mia edzino kaj mi la nometo Ry ĉiam portas belajn rememorojn, ĉar tie ni la unuan fojon vizitis junulargastejon.

Flanke de nia ĝardeno estis alta muro, sur kiu ofte sidis knabinoj, studentinoj de la najbara Højskole (Altlernejo), la kunveno de la ĉi-jara Internacia Junular-Kunveno organizita de T.J.O.

Kiam la estro de la lernejo eksciis, ke estas brita karavano en la gastejo, li invitis nin viziti lin. Ni danke akceptis la inviton kaj post la vespermanĝo ni iris en la lernejon. La estro kaj lia edzino tre afable regalis nin unue per siropo kaj kukoj kaj poste kondukis nin tra la diversaj partoj de la lernejo, klarigante al ni pri ĉio, kion oni tie studas. La estro bone parolis la anglan lingvon. Tiutempe nur knabinoj okupis la lernejon. En la aŭtuno kaj vintro nur knaboj venis por studi. Per la klarigoj de la estro ni tre bone komprenis la admirindan sistemon de la mondfamaj altlernejoj en Danlando.

Fine ni ĉiuj okupis sidlokojn sur balkono en la granda halo, dum la knabinoj, kun la helpo de knaboj el la vilaĝo, regalis nin per tre interesa prezentado de popoldancoj.

Dum tri, kvar tagoj nia karavano, sub la nelacigebla gvidado de Hans, esploris la belegan lagdistrikton ĉirkaŭ Ry. Per motorŝipetoj ni vojaĝis sur la lagoj, vagadis tra belega kamparo kaj surgrimpis Himmelbjerget. En la malprofundaj lagetoj ni vadis kaj klopodis naĝi kaj la tutan tempon la suno varme brilis.

Revenante de Ry al Århus, mia edzino kaj mi haltis ĉe la urbeto Skanderborg. Kiam ni trapasis la ĉefstraton, ni rimarkis, ke ĉie flirtas flagoj. Ŝajne io grava okazos. Mi demandis al policisto:

„Ĉu io grava okazas ĉi tie hodiaŭ?”

Li respondis angle, sed balbute: „Jes, okazas agrikultura ekspozicio kaj hodiaŭ, post eble unu horo, la reĝo mem venos. Se vi deziras vidi lin, mi akompanos vin, ĉar mi nuntempe estas libera.”

Ni kore dankis lin kaj akceptis lian proponon. Li akompanis nin al la ek-

spoziciejo kaj post nelonge nia nova amiko anoncis, ke la reĝo jam alvenis. Li gvidis nin al flanka enirejo, kie jam la anoj de la organiza komitato staris en du linioj por bonvenigi la reĝon. Nia amiko metis nin ĉe la fino de unu el la linioj kaj tie ni atendis. Tre baldaŭ la reĝo, tre alta sinjoro (la patro de la nuna reĝo), venis kaj manpremis ĉiun komitatano ĝis li atingis min. Sed oni ne prezentis lin al mi.

Fred Parker, Burnley, Britujo.

## VI ESTAS KIEL FLORO.

(Du bist wie eine Blume).

Aminda, bela, pura,  
Vi estas, kiel floro.  
Vidante vin, malgaja  
Estiĝas mia koro.

De mi al Dio iros  
Ĉi tiu preĝo nura:  
Li ĉiam vin konservu  
Aminda, bela, pura.

Heinrich Heine.

(Tradukis Mihaelo) Kopirajto rezervata.

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretarino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*).

De la aperinta T.J.O.-informilo „La Peranto” restis kvanto. Interesuloj senpage povas peti ekzempleron en la sekretarioj.

Informojn kaj dokumentojn pri nia I.J.K. en Ry oni bonvolu peti ne en Nederlando, sed rekte al la L.O.K., Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, Kopenhago, Danujo.

T.J.O.-anoj, vizitontaj la U.K. en Oslo tre kompleksus nin, sciigante tion al ni, pro eventuala speciala kunveno dum la kongreso. Samtempe menciuj, ĉu vi ĉeestos la I.J.K. en Ry.

Ricevita la dua bulteno de la germana T.J.O.-sekcio.

Depost aŭgusto 1951-a ni ricevis jenajn donacojn: H. G. T. (Dagenham, Brit.): f 5.—; K. M. (Brislington, Brit.): £ 1; N. W. (Denton, Brit.): £ 2; F-ino B. (Birmingham, Brit.): £ 1; S. d. J. (Tjerkwerd, Ned.): f 0,80.

Ĉiujn donacintojn ni multe dankas!

### Kiuj bezonas legajon?

Ni havas ankoraŭ kvanteton da malnovaj n-roj de „La Juna Vivo” (16-p.).

Ĉar la gazetoj povas esti utilaj por kurs- kaj grupvesperoj, ni tiucele volonte donacos ilin, kondiĉe ke oni antaŭpagu la sendkostojn (1 int. respond-kuponon por 15 gazetoj). Rapidu mendi, ĉar la stoko ne estas granda! (Adreso: T.J.O.-Centro, West-Grafdijk, Nederlando).

Ĉu vi jam varbis vian korespondanton por „La Juna Vivo”?

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**IBUSZ**, oficiala trafikoficejo, Lenin-Körút 67, Budapeŝt, Hungarujo, sendis du belege ilustritajn faldprospektojn: „Junularo en Hungarujo” kaj „La Sanigaj banlokoj de Hungarujo” kaj tre belan semajnkalendaron. Bedaŭrinde ĉiuj tekstoj estas germanlingvaj. Prezoj ne indikitaj.

**Oslo**, la ŝlosilo de Norvegujo, 6-p. ilustrita faldprospekto. Bona informilo pri la urbo de la ĉijara U.K.

**Nova movado marŝas** ..... 12-p. ilustrita broŝuro pri la Sansporto, reforma movado por laŭnatura vivmaniero; motivoj, programo, organizado. Kompilinto S. A. Jacobson, eld. Svenska Frisksportarförbundet en kunlaboro kun Sveda Esp. Federacio. Oni senpage povas ricevi la broŝuron de Sv. Frisksportarförbundet, Karlbergsvägen 14, Stockholm, Svedujo.

**Jarlibro de U.E.A. 1952, Unua parto.** Neaĉetebla, sed ricevebla nur de Individuaj Membroj de Universala Esperanto-Asocio, Herongate, Rickmansworth, Herts, Anglujo. — Krom la adresojn de 2018 delegitoj en 61 landoj, la jarlibro donas multe da aliaj utilaj informoj.

## GENERALAJ SCIIGOJ.

**Internaciaj Someraj Kursoj**, organizataj de la nederlanda Esp. Asocio (LEEN) kaj la „Flandra Ligo Esp.” okazos en Ermelo, Ned., de la 19-a ĝis la 26-a de julio. Informojn donas la administranto: s-ro J. Rooker, Lomanstr. 43<sup>a</sup>, Amsterdam-Z.

**Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj** estas aranĝataj de G.E.E. (la franca sekcio de la Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en 3 periodoj inter la 15-a de julio kaj la 31-a de aŭgusto. Oni petu informojn al f-ino J. Dedieu, 3 Rue Arzac, Toulouse, Francujo.

**Internacia Tendaro de la Socialista Junularo** okazos de la 1-a ĝis la 10-a de julio en Vieno. La junaj socialistaj Esperantistoj de Vieno starigos propran tendon kaj ekspozicios librojn. Esperantistoj anoncu sin tuj ĉe sia landa (loka) partioorganizo aŭ esperantlingve ĉe la Socialista Junularo, Vieno I, Teinfaltstr. 9, Aŭstrujo.

**La dua komuna Kongreso** de la Nederlanda Esperanto-Asocio „LEEN” kaj la Flandra Ligo Esperantista, je pentekosto 1952-a, okazos ne en Antverpeno, kiel oni unue anoncis, sed en **Rotterdam**. Informojn donas la sekretario: J. M. J. Driessen, Sam. Mullerstr. 7a, Rotterdam-W.

**Oficiala Instruado de Esperanto en Italujo.** La Ministro por Publika Instruado per sia cirkulero n-ro 12411 (21/2'52) informis la ĵurnalistan agent-ejon Stampa Internazionale, ke li aprobas la instruadon de la helplingvo Esperanto.

**E.N.I.T.** Via Marghera 2, Roma, Italujo, senpage disdonas turismajn broŝurojn pri Italujo en la plej gravaj naciaj lingvoj. Skribante, indiku la vizitotajn urbojn aŭ centrojn kaj petu la eldonadon ankaŭ en Esperanto.

„La Vojo al Mondpaco” estas la titolo de parolado, kiun faros Gunnar Rugland dum la 37-a U.E.A.-Kongreso, la 9-an de aŭg., vespere en la ejo de „Bios”, Kronprinsensgate 5, Oslo. Oni jam nun mendu enirinsignojn (prezo 2 N.Kr.) al G. Rugland, Finntorpvägen 8-III, Nacka, Svedujo. — La sama persono petas helpon por la starigo de Tutmonda Ekspozicio de idealistaj literaturaĵoj kaj artaĵoj. La ekspozicio estos en Oslo de la 1-a ĝis la 11-a de aŭg. '52. Seriozaj helpemuloj skribu al la supra adreso.

**Al la internacia kurso pri „Nuntempa Svedlando”** en Bohusgarden (27/7-2/8) povas aliĝi ankoraŭ kelkaj kursanoj. En la sama altlernejo okazos instruĉikurso por svedaj stud- kaj kursgvidantoj. Dum la vesperoj estos komuna programo. Ankaŭ prof. Lapenna prelegos. Kurskotizo 75 sv.kr. (por prelegoj, loĝo, manĝo kaj studekskurso). Sveda Esp. Instituto, Sibyllegat. 83, Stockholm.

## KORESPONDADRESOJ

*(Ĉiu abonanto unufoje jare rajtas enpresigi senpagan korespondadreson).*

**Aŭstrujo:** Por miaj 12-14-j. lernantoj en la gimnazio mi petas kiom eble plej multe da eksterlandaj gekorespondantoj. Skribu al Prof. Dr. Karl Beckmann, Wien III, Keinergasse 33/6.

**Britujo:** J. G. Humphris (15-j.) dez. korespondantinon en Nederlando. Int. pri aeroplanoj, lingvoj, pm. k.pk. Adr.: 62 Dell Rd., King's Norton, Birmingham 30.

**Bulgarujo:** 2 19-j. lernantinoj dez. kor. k. nederlandanoj. Tonka Ĉakarova, st. „Struma” 18, Burgas, kaj Katia Petkova, Kliment Ohridski 55, Burgas. 17-j. studento dez. kor. pri sporto kaj interŝ. bildk., fotojn, sportgazetojn. Iančo Ĥristov, Str. Drin 24, Burgas.

G. Minev, Str. Tolbuhin 88, Burgas, dez. kor. k. l.t.m., interŝ. poŝtm., gazetojn, k.t.p.

20-j. bankoficisto dez. kor. k. interŝ. pm. kaj gaz. Steffan Dimitrov, str. Moskva 67, Burgas.

**Ceĥoslovakujo:** 24-j. fraŭlo dez. kor. k. gejunuloj el l.t.m. por let. aŭ bildk. Klement Krebs, Dolní Jiretín u Mostu, Hornická 113.

**Hispanujo:** S-ro Juan Moyano Parra, str. Auziasmarchm 140, 4<sup>o</sup>—2a, Barcelona, kor. k. tutmonda esperantistaro per pk., let., Certa respondo.

S-ro Raf. Sorolla, str. Torrente Vidalet, 13,1<sup>o</sup>, Barcelona, dez. interŝanĝi poŝtm. k. ĉiuj landoj.

S-ro José Abad López, str. Enteza 33, pral. 2a, Barcelona, dez. kor. pri maraj temoj kun seriozuloj.

S-ro Ant. Gomáriz Sánchez, sre. Premiá, 23,2<sup>o</sup>, 1a, Barcelona, dez. interŝ. ideojn, sugestojn k.t.p. p. kinaj aparatoj k.a. div. stilaj metodoj.

F-ino Merc. López Arandía, str. Marqués del Duero 165, bajos Barcelona, dez. interŝ. ideojn kaj ric. desegnojn por la fabrikado de peltovestoj ktp.

Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo” ('35/'36 kaj '36/'37) po ...	f 1,—
Bicikloflaĝetoj: f 0,75 — Insignoj (kun ŝraŭbeto) .....	f 0,75
Kantaro „La Juna Vivo” f 0,75 — 10 malnovaj E-gazetoj .....	f 1,—
Ĉiujn librojn, vortarojn kaj esperantaĵojn liveras la TJO-Libro-Servo,	
Hof v. Delftlaan 79, Delft. Ĝirnumero 570720.	